


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2004



Kuraĝega esperantistino! La statuo estas farita el unu jadŝtonego kaj kostus kvaronmilionon da juanoj aŭ pli-malpli 25 000 eŭrojn. – Artikolo pri Pekina UK sur p. 5.

Venontaj: BB3, VT, KEF, p. 13-18

Trejnseminario kun Ziko Sikosek, p. 20 ♦ Fabelkonkurso, p. 25

Civitana ĵurnalismo, p. 8 ♦ Historio de FEJO esplorata, p. 26

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@tiscali.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonaj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihteri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

tgrundstrom@

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ www.lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@helsinki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timospi@suomi24.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ ✉ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Informfaciligo “NIAURBE” kaj Brusele

NIAURBO celebras Mondan Tagon de Esperanto – Diskutinda solvo por lingva problemo

Gazetara komunikado de Niaurba Esperanto Asocio

TT/12/2004. La Monda Tago de Esperanto, la 15an de decembro 2004, estas festo de lingva egalrajteco kaj neŭtrala multlingvismo. Ankaŭ en NIAURBO la tago estas celebrata. “Estas la tago por montri la riĉecon de Esperanto kaj kuraĝigi NIAURBANOJN lerni ĝin,” diras ANTAUNOMO FAMILINOMO, de la NIAURBA ESPERANTO ASOCIO. [La grupo invitas siajn membrojn kaj interesitojn al la Esperanto-tago la xx-an de decembro 2004 al EJO, ADRESO]

Jen cito de teksto veninta pere de retpoŝto. La Brusela Komunikadcentro kolektas tradukojn de la baza teksto, aperigas ilin en www.lingvo.org por libera uzo de aktivuloj. La BKC kolektas ankaŭ aperintajn artikolojn. La reta kolekto estas impona.

“Ni volas interparoli sen lingvaj barieroj. Sed en multaj landoj ĉiam pli kaj pli nur la angla lingvo estas uzata, tiel ke parolantoj de aliaj lingvoj estas en malavantaĝa pozicio. Tio ne estas justa,” diras FAMILINOMO. Esperanto-parolantoj celas konservi ĉies gepatran lingvon, kaj proponas la uzon de neŭtrala Esperanto en la internaciaj rilatoj.

La komunikado ekzempligas du aspektojn de la informenhavo pri esperanto. Ni havas la projekton esperanto, proponon por la estonto. “Ni volas interparoli ...” kvankam ni ja jam interparolas. Ni ne konsideras justa ke “...nur la angla estas uzata”. Ni volas ion ŝanĝi. Aliflanke ekzistas

la reala esperanto, tiu kiu ne estas propono aŭ deziro, sed jam funkcianta.

“Esperanto estas parolata en ĉirkaŭ 120 landoj,” diras FAMILINOMO. “Ĝi ne posedas komplikajn regulojn kun multaj esceptoj.” Esperanto dum la lastaj jaroj renkontis kreskantan interesecon. “Ekzistas rok- kaj popmuziko en Esperanto, infanoj povas legi bildstriojn kiel ‘Asterikso’ [rimarko: uzu en via nacilingva versio eventuale aliajn en via lando pli konatajn bildstriojn]. Ankaŭ originala literaturo abundas en Esperanton. Okazas ankaŭ amaso da aranĝoj por Esperanto-parolantoj dum la tuta jaro,” certigas FAMILINOMO.

Ne aperas mencio pri Zamenhof, ne pri tago de la esperanta libro, ne pri la kvanto de parolantoj. Eblus fari tute alian komunikon kaj ĉiu estas tion bonvena fari. Malofte finnaj kluboj eluzis la helpon, sed tamen la instigoj estas utilaj. Krome aparte atentindas la pinta agado de BKC, la rektaj rilatoj kun ĵurnalistoj, politikistoj kaj funkciuloj. Kiel ekzemplan rezulton mi mencias la Bruselan gazeton The Parliament Magazine n-ro 192 (www.parliamentmag.com) kun lingvopolitika temo. Dafydd ap Fergus kaj Marko Lins faras gravan laboron.

Bonan festadon deziras

Anna Ritamäki

PS. BKC akceptas donacojn. Donacantoj de 25 eŭroj aŭ pli povas danke ricevi abonon de La Ondo de Esperanto 2005. Pagante rekte de UEA-konto aŭ pere de la UEA-ĉefdelegito Heta Kesälä menciu “por eece-p, Komunikadcentro”. Detala BKC-raporto aperas ĉe: <http://lingvo.org/dokumentoj/raporto200406.pdf>



Flanke de la mondpotencoj

Ni esperantistoj havas esperplenajn rilatojn kun UN. Ĝia eduka, scienca kaj kultura or-

ganizo Unesko antaŭ duona jarcento agnoskis la valoron kaj la idean specialecon de Esperanto. En Finnlando EAF estas membroasocio de la landa UN-asocio.

Duona jarcento da oficialaj rilatoj kun UN tamen apenaŭ signifis tiom da prosperon por Esperanto, kion la esperantistoj en jaro 1954 povis esperi. Oni certe ne hodiaŭ vidas la ĝeneralsekretarion de UN paroli per televido komunan mesaĝon al tuta homaro en Esperanto – kvankam tia scenaĵo verŝajne povis esti tute realisma tiam kiam la agnosko por Esperanto en Unesko fariĝis, kaj same povus por ni esti, se ni projektas nian imagon duonan jarcenton antaŭen.

La hodiaŭa mondo ne tamen ŝajnas esti facila por idealisma menso. (Kaj tio ne estas mi, mi ja estas plena cinikisto.) Ni vivas en mondo, kie militemaj blokoj batalas unu kontraŭ la alia. Mi estis junulo (kaj pli idealisma ol nun) en la 80-aj jaroj, kiam disfalis unu mondpolitika situacio, kie du fortaj blokoj kontraŭstaris unu la alian. Por mi la 80-aj jaroj aperas esti tempo de feliĉo kaj espero, kiam ĉiuj kredis je bonfarta kaj bonvolema estonteco, ankaŭ pro multaj aliaj aferoj ol disfalo de dupolusa mondpolitika situacio. Ŝajnas, ke la optimismo de la 80-aj enhavis ankaŭ supozon, ke baldaŭ la ĉefo de UN estus la plej potenca homo en la mondo.

Mi ne komencas ĉi tie analizi, kiu nuntempa mondpolitika bloko faris kion, sed ni certe ne vidis evoluon direktan de tio, ke UN estus la reale mondgviganta organizo, kiun oni esperas ĝin esti. La mondo estas nun malpli dupolusa

ol antaŭe, sed apenaŭ malpli karakterizata de militemaj blokoj.

Nun dum kelkaj lastaj semajnoj ni vidis, ke du mondpotencoj elektis siajn gvidantojn. La usona elektado finiĝis je rezulto, kiun plejparto de cetera mondo bedaŭras, eĉ timas la sekvojn de la militismo. Tamen oni ja devas konscii, ke ankaŭ la ĉefa alternativo de la venkinto estis neniam reprezentanto de pacifismo. Flanke de la Eŭropa Unio ni civitanoj balotis jam en junio pri la parlamentanoj, kaj la estraro de la unio, la komisiono de EU, nun dum novembro, rezulte de intertraktado kaj kompromisado inter nacioj, formiĝis.

Meze de ĉio tio la ĉefo de UN ŝajnas lasiĝi en tre flanka rolo en la monda decidfarado. Ankaŭ la elekto de la ĝeneralsekretario de UN ne atingas tiom grandan publikecon. Dum la kampanjoj de la kandidatoj por usona prezidenteco eĉ mi ĉi tie en Finnlando aliflanke de la globo rigardis rektan televidan elsendon pri debato de la du kandidatoj. Dum la elekta proceso de la EU-komisiono niaj ĵurnaloj spekulaciis pri la taŭgeco de diverslandaj kandidatoj por la komisiona posteno. Mi ne memoras, ke la kandidatoj por ĝeneralsekretarieco de UN estus iam atingintaj tiom da publikecon.

Post ĉio strebo de esperantistoj la Eŭropa Unio ankoraŭ ne vere agnoskas la eventualan utilecon de Esperanto en sia funkciado. Estas kelkaj malmultaj esperantistoj aŭ subtenantoj de Esperanto en la Eŭropa parlamento, sed ni estas ankoraŭ malproksime de la situacio, ke Esperanto estus unu oficiala EU-a lingvo, aŭ teknika helplingvo de EU, aŭ ke tio eĉ estus tre serioze konsiderata.

Mikko Mäkitalo

Unuafoje en Universala Kongreso

Ĉi-jare mi partoprenis Universalan Kongreson en Pekino. Tio estis mia unua UK kaj krome mia unua vojaĝo al Azio. Mi vere esperas, ke mi havos okazon fari ambaŭ multfoje.

Mi uzis la germanan aviadkompanion Luft-hansa. Do, mi unue flugis al Frankfurto kaj atendis tie la ekflugon al Pekino dum kelkaj horoj. Atendante mi ekvidis mezaĝan, malgrandan viron, kiu portis verdstelan sakon. Mi salutis lin kaj ni ekbabilis. Kompreneble, li ankaŭ estis survoje al la UK. Li venis el Norvegio. Li rakontis pri esperantaj aranĝoj, kiujn li partoprenis, interalie pri iu kongreso, kie li loĝis kun "Satano". Vidante mian miregantantan mienon, li ridetis kaj klarigis, ke temis pri ano de Sennacieca Asocio Tutmonda, do SAT-ano!

En Pekino lokaj samideanoj atendis nin, kun klare videblaj Esperanto-simboloj. Post iom da tempo ili gvidis nin al malgranda aŭtobuso, per

kiu ni veturis al niaj loĝejoj. Survoje ni vidis ankaŭ la kongresejon. La hoteloj situis iom dise, kaj mi konfuziĝis pri la vojo. Poste mi piediris serĉi la kongresejon. Subite iu diris al mi esperante: "Saluton!" Mi vidis du nekonatajn homojn kaj miris dum duonsekundo, kiel ili sciis, ke mi estas esperantisto. Poste mi ekkomprenis, ke mi ja portas KEF-an T-ĉemizon. Do, mi salutis ilin kaj eksciis, ke ankaŭ ili serĉas la kongresejon. Post nelonge ni trovis ĝin. Ni ne eniris, ĉar la antaŭa kunveno ankoraŭ ne finiĝis tie.

La sekvan tagon mi trovis la kongresejon tute senprobleme; ĝi estis ĉe la sama strato kiel mia hotelo. Nur la trafiko timigis min. Estis multege da biciklistoj, kies trafikregulojn mi ne komprenis. Sur pluraj vojoj la aŭtoj veturis nur al unu direkto, sed bicikloj al ambaŭ direktoj. Mi lernis rigardi ambaŭdirekten antaŭ ol iu akcidento vere okazis, sed kelkfoje nur dank' al bona ŝanĉo.



La strato antaŭ mia hotelo. Kutime estis multe pli da biciklistoj. Meze de la strato videblas afiŝoj penditaj ambaŭflanke de la lanternaĵoj, sur kiuj estis skribita "La 89-a Universala Kongreso de Esperanto" ĉine kaj esperante. La kongresejo estis sur la sama strato.

Kiam mi eniris la kongresejon, mi tuj ekvidis la ununuran ĉinian esperantiston, kiun mi konis, sinjoron Hŭang. Li vizitis Suomion pasintsomere kaj loĝis ĉe mi dum unu semajno. Li estis tre okupita, do li nur montris al mi, en kiu vico mi devas stari por esti fotita kaj poste ricevi la kongresan nomŝildon kun bildo. Estis jam multege da homoj, sed ĉio iris glate kaj mi ricevis la ŝildon post nelonga atendo. Mi komencis babili kun la aliaj partoprenantoj. La etoso estis agrabla.

La solena malfermo de la kongreso okazis la sekvan tagon. Pluraj ĉiniaj gravuloj ĉeestis kaj paroladis. Ho, tiam oni bezonis kongresan interpretiston eĉ en esperanta kongreso! Komprenoble ankaŭ esperantaj gravuloj paroladis, kaj denove interpretistoj laboris. Poste venis salutoj el ĉiuj landoj, el kiuj venis partoprenantoj. Mi estis la suomia salutanto. Mi diris jenon: “Etnane belas revii, nu, en UK, kune universale benante. Finnlando salutas vin!” La unua frazo estas palindromo – oni povas ĝin legi inverse, ekde la fino ĝis la komenco. Preskaŭ ĉiuj salutoj estis same mallongaj, kiel ja indus, ĉar ni estis kelkdek personoj. Tamen kelkaj salutantoj parolis iom pli longe, kaj unu eĉ kantis! Vere, li havis

belan voĉon. Ekde la komenco, la kongreso estis surpriza kaj plezurega.


Mi jam partoprenis plurajn matematikistajn kongresojn, do mi spertis tion, ke estas pluraj samtempaj programeroj, inter kiuj oni devas elekti. Bedaŭrinde estis ofte malfacile elekti, ĉar min tre interesis tiom multaj programeroj. Nu, ĝenerale mi estis kontenta pri la aranĝoj, kiujn mi ĉeestis. Mi ankaŭ havis sufiĉe da tempo por babili kaj iom promenadi en la ĉirkaŭaĵo.

Unu tago estis rezervita por ekskursoj. Mi iris al la Granda Muro. Survoje nian aŭtobuskaravanon akompanis policianoj, kiuj helpis nin atingi la celon senprokraste; ni estis traktataj kiel ŝtataj gastoj. Unue ni vizitis imperiestran maŭzoleon, kiu estis profunde sub la tero. Ni parkumis tuj ĉe la eniro, dum la parkumo por ordinaraj turistoj estis sufiĉe malproksime. Okazis same ĉe la muro. Ni grimpis supren, ĉiu laŭ siaj fortoj kaj volo. Surpinte oni povis fotigi sin kaj farigi atestilon pri sia atingo. Nia cicerono estis atentiginta nin pri tio, ke en turismaj lokoj indas diskuti la prezojn. Mi iel preteratentis tion kaj pagis senhezite 100 juanojn (pli-malpli 10 eŭrojn) pro la atestilo. La vendanto eĉ iom primokis mian pagemon, se mi bone lin komprenis. Nu,



Sur tiu strato mi vidis multajn tiajn frandaĵojn, sed ĝuste tiam mi ne estis tre malsata.

“Unuhoma strateto”. La ideogramoj signifantaj “unu” kaj “homo” estas sufiĉe facilaj, “strateto” estas iom pli komplika.



ne gravas, mia monujo ne elĉerpiĝis... Poste ni vizitis ankaŭ iun multvendejon, kie oni povintus aĉeti multegajn aferojn, eĉ grandan jadstatuon de leopardoj pro 250 000 juanoj (25 000 eŭroj). Tiam mi jam decidis esti iom pli ŝparema kaj ne aĉetis ĝin.

Mi tre ŝatas ĉinian kaligrafion, kaj mi volis aĉeti skribpentrilon kaj inkon por mem provi lerni tiun arton. Mi petis mian novan ĉinian amikino, fraŭlino Daj, helpi min serĉi tion. Ŝi estis komencanto, do ni unue bezonis iom da tempo por esti certaj ke ŝi bone komprenas mian peton. Poste estis sufiĉe facile. Ni trovis multvendejon kun ankaŭ tiaj aferoj, kaj ŝi klarigis al mi la aĉetmanieron, kiu estis laŭ mi iom komplika. Sen ŝi mi certe havintus problemojn kompreni, kiel mi devas agi.

Ĝenerale la ĉinoj estis tre afablaj homoj, sed mi iom timis, ke mi estas eksterlanda stultulo, kiu nenion komprenas pri bona konduto kaj ĝentileco. Tamen mi tre ŝatus viziti Ĉinion denove, kaj tiufoje mi ne intencas atendi kvardekon da jaroj!

Taneli Huuskonen

Internacia Amikeca Esperanto-Renkontiĝo

Okaze de centjariĝo de la unua Universala Kongreso de Esperanto Nordfrancia Esperanto-Federacio aranĝos en Boulogne-sur-Mer renkontiĝon dum la pasko ekde vendredo la 25-a ĝis marto la 30-a de marto 2005.

Aliĝkotizo 85 eŭroj. Loĝkostoj en diversnivelaĵoj hoteloj, por unu nokto por unu persono, ekde 21 eŭroj (senstela hotelo, dulita ĉambro) ĝis 136 eŭroj (kvarstela hotelo, unulita ĉambro). Aliaj malpli kostaj loĝeblecoj ĉe loka gastiganto, en junulargastejo kaj en kampadejo.

En programo i.a. folkloro dancado de Soleil Boulonnais, prelegoj de Claude Piron kaj aliaj, kanzona spektaklo de Meven kaj J. Yvart, teatra spektaklo, kvar ekskursoj: Ĝenerala vizito de la urbo; Vizito de la haveno kaj domo "La Beurière"; Vizito de natura loko kaj bierfarejo de l' Du Kaboj; Tuttaga ekskurso laŭ la paŝoj de Zamenhof.

Plena informilo kaj aliĝilo ricevebla de la ĉefredaktoro. Informoj kaj ebleco aliĝi ankaŭ en interreto www.boulogne2005.com (mm)

Civitana ĵurnalismo

En oktobro mi partoprenis, en rolo de ĉefredaktoro de Esperanta Finnlando, seminarion pri civitana ĵurnalismo, organizitan de Vihreä Sivistys- ja opintokeskus, ViSiO, per kosto de AKK. La seminario havis titolon "Kansalaisjournalismi – kuuluuko kansalaisen ääni?" (= Civitana ĵurnalismo – ĉu audeblas voĉo de civitano?)

Antaŭ la seminario mi ne havis pri civitana ĵurnalismo iun ajn scion aŭ imagbildon krom kion la termino per si mem klarigas. Celgrupoj de la seminario estis difinitaj estroj kaj komunikaj responsuloj de organizoj, redaktistoj de regionaj kaj lokaj gazetoj kaj aktivaj civitanoj. Prelegis universitata esploristo de ĵurnalistiko, du (profesiaj) redaktistoj kaj (profesia) asocia informada ĉefo.

La ideo kaj ĝia naskiĝo

La ideo de civitana ĵurnalismo naskiĝis en Usono fine de la 1980-aj jaroj. Ĝia instigo estis la novaĵraportado en amaskomunikiloj pri elektado de la prezidento. Oni en amaskomunikiloj diskutis nur kiel pri konkurso, kiu estas en la enketoj en gvidanta pozicio, kaj kiel la kandidat-oj sin prezentas en televidilo. Tute forgesiĝis realaj opinioj de la kandidatoj. La mondo de la novaĵoj estis tre distanca de la ĉiutaga vivo de civitanoj. Sekvis, ke civitanoj ne fidis je amaskomunikiloj aŭ je politiko. Al tiu situacio ligiĝis, ke abonkvantoj de ĵurnaloj malkreskis.

La komunikiloj komencis zorgi pri la situacio kaj serĉi rimedojn ŝanĝi la evoluon. Oni volis, ke voĉo de ĝenerala civitano iĝus aŭdata. Ne sufiĉas, ke en gazetoj estas sekcioj por leteroj de legantoj, aŭ similaj konceptoj en radiaj elsendaĵoj, kie civitanoj povas elparoli siajn opiniojn (en finna radio ni konas programon "Kansanradio"). Ankaŭ en redaktita gazeta artikolo aŭ radioprogramo indas esti traktita la vidpunkto de civitano.

Oni povus pensi, ke la fenomeno estus ĉefe usona, ĉar tie la enketado lige de politikaj elektoj kaj la tuta "amaskomunikila cirko" estas tre elstara. Ni tendencas pensi, ke ĉi tie en Eŭropo aŭ en Finnlando ni ĉiukaze diskutas pri realaj aferoj kaj la politika vivo estas ne tiom surfaca televida prezentado kaj aktorado. Tio estis almenaŭ mia unua penso pro la ilustrado de la afero en la seminario.

Sed ni tamen konfesu, ke ni ne povas esti tute liberaj de la sama fenomeno. Se ni sekvas pli kaj pli grandskalajn amaskomunikilojn, certe la imagbildo pri politiko minacas pli kaj pli apartiĝi de la ĉiutaga vivo. Kaj en lastjara parlamenta elektado jam okazis, ke oni ofte prezentis la tutan balotadon esti nur persona konkurso de la prezidantoj de la tri ĉefaj partioj, kvazaŭ la prezidanto de la plej granda partio iel persone estus la venkanto. Se oni en ekzemple Usono jam antaŭe disvolvis rimedojn kontraŭ la evoluo, ni ne tro hezitu laŭbezone akcepti la samajn.

Aplikado de civitana ĵurnalismo

Kiam oni aplikas la ideon de civitana ĵurnalismo en ĵurnalo, ĝenerala civitano estas en ĉefa rolo. En elektado de temoj por la ĵurnalo: kio estas grava afero por civitano? En maniero trakti la temojn: kio estas la signifa vidpunkto de la civitano? Civitana ĵurnalismo estas por la redaktisto pli malfacila kaj laborplena maniero labori ol tiu kutima, ke oni nur iras al la ĉefa spertulofakulo de la temo por demandi opinion.

Oni celas al multformeco, diskutanteco kaj aktiveco. Kaj mallarĝigi la spacon inter civitanoj kaj ĵurnaloj, kaj per tio ankaŭ inter civitanoj kaj decidantoj.

Oni faris provojn pri civitana ĵurnalismo en multaj finnaj ĉefaj gazetoj. Unu ekzemplo estas la traktado de la parlamentaj elektoj 2003 en Helsingin Sanomat. Samtempe kiam oni povis

rekoni la fenomenon, ke publika diskutado pri politika elektado apartiĝas de ĉiutaga vivo, en Helsingin Sanomat oni tamen strebis realigi la kontraŭan ideon de civitana ĵurnalismo.

En Finnlando estas almenaŭ unu ĵurnalisto, kies posteno estas difinita civitanredaktisto, Chime (”Simppu”) Bavard en Itä-Häme, ĵurnalo aperanta en Heinola. Tamen estas konstatinde, ke multaj ĵurnalistoj, speciale en malgrandaj lokaj gazetoj, ne vidas grandan diferencon inter civitana ĵurnalismo kaj la ĵurnalismo kion ili ĉiutage realigas, sen aparte nomi ĝin civitana ĵurnalismo.

Afero ne por Esperanta Finnlando

Evidente civitana ĵurnalismo estas afero ĉefe por profesie faritaj ĵurnaloj, ne por asociaj gazetoj kiel Esperanta Finnlando. Mi ne povas facile imagi racian manieron, kiel mi en rolo de ĉefredaktoro de Esperanta Finnlando komencus apliki la ideon de civitana ĵurnalismo.

Ĉi tie ni ja devas noti, kio estas la diferenco inter ĵurnalo kaj asocia membrogazeto. Ĵurnalo estas, laŭ difino, ĉiutaga gazeto – aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiutaga. Ĝi serĉas sian temaron el tiaj ĝeneralaj aferoj, kiuj koncernas proksimume ĉiujn civitanojn en iliaj ĉiutagaj vivoj. Ĵurnalo celas esti legata de signife granda parto de la loĝantoj de sia regiono. Al tia celo estas inventita civitana ĵurnalismo.

Asocia gazeto, kiu aperas unufoje por ĉiu dua monato, havas multe alian celon. Ĝia legantaro estas nur tiu malgranda parto de homoj, kiuj membriĝis en tiun asocion. Tial nia gazeto devas ankaŭ serĉi siajn temojn el tiu limigita kampo, kiu koncernas la limigitan legantaron.

Rekta aplikado de civitana ĵurnalismo ŝajne signifus, ke mi provus demandi de homoj ĝenerale, kion Esperanto signifas por ili aŭ kiamaniere ili uzas ĝin. Evidente la respondo de preskaŭ ĉiu estus, ke ili ne scipovas Esperanton, eĉ ne scias, kio tio estas, kaj ne uzas ĝin, kaj tio estus proksimume ĉio. Ni ja povas esperi, ke iam Esperanto estus afero kiun konus kiu ajn civitano,

sed tiam ni jam loĝus en multe alispeca mondo ol nun, kaj tiam Esperanto ne plu estus afero por malgranda hobie farita asocia gazeto.

...sed afero por Esperanto

Estas ankaŭ aspektoj, pro kiuj civitana ĵurnalismo koncernas esperantistojn. Almenaŭ unu tia elstaris en trejnseminario de AKK, tio estas la fakto, ke multaj homoj havas malfacilecon en lernado de fremdaj lingvoj. Ĉiu lerneĵano en Finnlando devas studi fremdajn lingvojn, kaj malfacileco en tio certe estas afero, kiu koncernas civitanojn, do eventuala temo de civitana ĵurnalismo. Ni ja havas taŭgan solvon por tio: Esperanton! Estas ne nur, ke Esperanto mem estas facila lingvo por lerni, sed ankaŭ ke lernado de Esperanto faciligas postan lernadon de aliaj fremdaj lingvoj.

Do, kiam civitana ĵurnalismo levas en ĵurnal-an diskutadon la malfacilecon de lingvolernado, ni ne hezitu uzi la okazojn por menciigi, ke la solvo ekzistas.

Mikko Mäkitalo

La Premio “Ada Sikorska” unufoje aljuĝita

En Salou (Katalunio, Hispanio) la 4-an de oktobro estis unufoje asignita la internacia Premio “Ada Sikorska Fighiera”. Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro la plurjardeka sindediĉa agado por Esperanto en diversaj landoj kiel kurs-gvidanto, preleganto, organizanto de multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj.

La transdono okazis en la kadro de la 12-a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo, malfermita de loka urbestro: cento da esperantistoj el ses landoj partoprenis en la Semajnaj programoj (prelegoj, debatoj kaj ekskursoj). La venonta ĉiujara premio, dediĉita je la memoro de Ada – kiu dum 35 jaroj redaktis kaj eldonis la tiam sendependan “Heroldo de Esperanto” – estos asignita en aŭtuno 2005.

EpoGo – Esperanto por gimnazianoj

La kvarteto Lars Forsman, Christer Lörnemark, Kjell Randhed kaj Folke Wedlin nun pretas presigi la duan version de sia lernolibro, nur iom ŝanĝita de la proveldono. Ĝi estas tre ampleksa – tekstlibro je 164 paĝoj, ekzerclibro je 182 paĝoj kaj gvidlibro je 101 paĝoj. La lernilo aspektas tre moderna kun tre belaj kovriroj kaj multe da koloraj fotoj, faktoj, dudirektaj vortlistoj, vortlisto por komputilado, diversaj vortfamilioj, gramatikaj komentarioj, proverboj post ĉiu ĉapitro, la historio de Esperanto, fonologia priskribo, proponlisto de facilaj legolibroj, lernolibroj kaj faklibroj por studado, ekzercoj, solvoj kaj testoj. La kvin unuajn ĉapitrojn oni povas uzi kiel mallongan studrondan kurson.

La lernolibroj EpoGo kompreneble kostas relative multe – po 300 svedaj kronoj, same kiel aliaj lingvolibroj de la gimnazio.

Seminario, kie oni uzos la lernolibron

En februaro la la 8an kaj 9an okazos seminario en la Popola Altlernejo de Karlskoga por lingvoinstruistoj sen scio pri Esperanto. Ili ricevos larĝspektran informon pri la lingvo kaj la tekstlibron "Esperanto por Gimnazioj". Poste ni

esperas, ke kelkaj volas daŭrigi la studadon per letera kurso, distanca kurso, semajnfinaĵ renkontiĝoj aŭ simile. Montris sin, ke instruistoj en diversaj lernejoj, sciante Esperanton, ofte povas entuziasmigi multe da studentoj ĉirkaŭ si kaj eĉ ekinstrui. Jen nia ideo kaj celo de la seminario. Bonvolu sciigi al instruistoj kaj lernejestroj pri tiu ebleco. La instrulingvo dum la seminario estos la sveda.

Informmaterialojn vi povas ricevi de mi (larsespo@yahoo.se) aŭ de Anders Thunberg (anders.thunberg@folkbildning.net)

Kun koraj salutoj!

Lars Forsman

Esperantofako

Karlskoga folkhögskola

S-691 24 Karlskoga

La tekston de Lars Forsman malplilongigis la prezidanto de ELFI Carola Antskog, kiu ankaŭ faris la suban svedlingvan tekston pri la seminario. Se vi volas aĉeti la librojn bonvolu kontaktiĝi kun ŝi. La prezo por ĉiuj tri libroj estas preskaŭ 100 eŭroj.

Esperantoseminarium i februari

Under tiden 8-9 februari ordnar Karlskoga folkhögskola ett seminarium för språklärare utan förhandskunskaper i esperanto. De erhåller en bred information om språket och textboken "Esperanto por Gimnazioj". Idén är att de senare lär sig mera genom självstudier eller på annat sätt. Det har visat sig att lärare som själva känner till esperanto kan uppmuntra sina elever att delta i kurser. De kan också rätt snabbt utbildas till esperantolärare. Deltagare från Finland kan anhålla om resestipendium från lärarföreningen ELFI.

Internacia Kongresa Universitato 2005

Dum la 90-a UK en Vilno okazos la 58-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kie rajtas lekcii universitataj profesoroj kaj personoj kun simila kvalifiko.

UEA invitas tiajn personojn rete aŭ papere prezenti siajn proponojn pri prelegoj al la sekretario de la IKU-komisiono, prof. dr-o Christer Kiselman, <kiselman@math.uu.se>, Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedio, plej laste 2005-01-15.

Okazos ankaŭ studsesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun

Montevideo 10.XII.1954 – memorinda datreveno

Kiel konate UEA estas en konsultaj rilatoj kun Unesko ekde 1954. Vendredon la 10-an de decembro en la menciita jaro Unesko oficiale rekonis la valoron de Esperanto por la scienco, la edukado kaj la kulturo. Estis historia tiu momento ne nur por nia Movado, sed ankaŭ por la kulturo de la mondo.

Sabaton matene ĉiuj gazetoj alportis la novaĵon. La gazeto "La Tribuna Popolar" de la dek-unua de decembro notis ĝin sub la titolo "Triumfo del Esperanto". Estis fakte vera triumfo. Profesoro Carlo Minnaja detale raportas pri la okazintaĵoj en la verko "Eseoj memore al Ivo Lapenna" (2001).

Okaze de la jubilea jaro indas relegi pri tiu memorinda Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco, dum kiu en Montevideo vere sukcese defendis Esperanton prof. d-ro Ivo Lapenna. Ni ja konas liajn oratorajn talentojn kaj atingiĵojn. Feliĉe ankaŭ hodiaŭ ni havas eblecon ĝui pri la parolarto de Ivo Lapenna, ĉar estas eldonitaj du kompaktdiskoj (2003) enhavantaj elokventajn paroladojn de la prestiĝa korifeo. Krome estas grave ne forgesi la verkon "Elektitaj paroladoj kaj prelegoj" (1966), en kiu ni per okuloj povas sekvi la faman oratoron sur internaciaj podioj.

Ĉiu parolado lia estas verko de fekunda menso, prezentita kun la krea spontano de vera oratoro. Lia simpatia voĉo kaptas nin. Ĝi gvidas aŭskultantojn tra la valora kaj vive prezentita enhavo.

Prof. J.C. Wells skribas: "En unu afero Ivo Lapenna restas por mi ideala figuro, inspira modelo: nome kiel parolanto de Esperanto. Ĉu temas pri oratorado, ĉu temas pri ĉiutaga konversacio, mi admiris kaj admiras lian lingvokapablon. Lia propra lingvofono – la kroata kun konsiderinda influo de la itala – dotis lin per prononco tre proksima al la internacia Esperanta idealo. Lia konscio de sia publiko pelis lin al klara esprimado, al eleganta sed simpla elekto de vortprovizo, kaj al perfekte formulita sintakso. Li mem flegis sian lingvouzon, kaj per sia ekzemplo montris al aliaj kiel fari same. Lia daŭra testamentiĵo troviĝas ne nur en la organizado de la movado, sed ankaŭ en la "la fundamento, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de Esperanto", nome en la lingvo mem."

Dankeme ni konservu la memoron pri tiu ĉi signifa atingiĵo antaŭ kvindek jaroj en Montevideo 1954.

Jorma Ahomäki, Turku

- ▷ UEA. Membroj de AIS povas samtempe proponi kursojn, kies unua lekcio povus esti parto de la IKU.

La propono enhavu (1) mallongan resumon de la prelego en Esperanto, (2) mallongan resumon en la angla, franca, germana aŭ rusa (laŭ propra elekto), kaj, se eble, en la litova, (3) koncizan biografieton kun persona bibliografio kaj foto taŭga por publikigo.

La prelegoj prefere, sed ne devige, rilatu al la kongresa temo, kiu estas "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado".

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj kaj tiuj kiuj ankoraŭ ne prelegis en iu IKU. Prelego estos rekompencita per modesta honorario.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Dulingveco protektas la cerbon

Se vi fluas per du lingvoj, via cerbo verŝajne restas en pinta kapablo ankaŭ en maljuneco. Dulingvuloj ŝajnas sukcesi pli bone ol unulingvuloj en testoj, kie oni mezuras intelektajn kapablojn kaj rapidecon de reagoj. Daŭra ŝanĝado el unu lingvo al alia evidente ekzercigas la cerbon.

En la kanada esploro partoprenis pli ol cent homoj el aĝoj de 30 – 88 jaroj. En dulingvaj familioj oni hejme parolis la francan aŭ la tamilan kaj krome la anglan. La kompara grupo regis nur la anglan. Ĉiuj havis similan edukon kaj socialan fonon, rakontas revuo *Psychology and Ageing*.

(el gazeto *Tiede tradukis mm*)

E-festivalo Aroma Jalto

17-an fojon okazos E-festivalo Aroma Jalto, 30.04-09.05.2005.

Jalto printempe estas io eksterordinara. Vekiganta montaro, verdiriganta arbaro, freŝaj herboj, aromoj de floroj kaj senlima blua Nigra maro. Muĝo de ondoj, forkurantaj al horizonto, varmaj ŝtonoj kaj printempa karesa suno, varmigan animon kaj koron.

Jalto printempe estas la renkontiĝo de geamikoj, kiujn kunligas komuna lingvo, similaj intereso kaj frateca etoso.

Jalto printempe estas paradizo sur Tero, kiu vizitendas, almenaŭ unufoje dum la vivo.

Loko: Krimeo, Jalto – la plej populara kaj fama kuracloko de Ukrainio

Loĝado: En 2-, 3-, 4- aŭ 5-litaj ĉambroj kun lavabo, necesejo kaj duŝejo, kontraŭ 3 – 6 EUR diurne. Loĝado ne estas ebla sen nutrado.

Nutrado: En la sama ripozejo, kontraŭ 3,5 EUR 3-foja.

Programo: Seminarioj por Esperanto-instruantoj; seminario de INTERKULTURO; lingvaj diversgradaj kursoj; Universitato; lingva prezentado; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; KGS;

Lingvokapablo parte biologia

Lingvosciencistoj rimarkis unikan eblecon esplori, sur kio baziĝas nia fajna kompreno pri lingvo. Ĝin ofertas juna gestolingvo en Nikaragvo. Ĝi naskiĝis antaŭ nur trideko da jaroj, kiam en fino de la 1970-aj jaroj oni fondis en tiun landon lernejon por surduloj. Tial la plej aĝaj gestolingvumantoj nun estas nur 45-jaraj.

Ann Senghas el universitato Columbia en New York komparis gestaĵojn de lingvouzantoj de diversaj aĝoj kaj rimarkis ilin esti diversaj. "La plej aĝaj komunikas per krudaj movoj stile de pantomimoj, junaj dispecigas siajn mesaĝojn en partojn same kiel oni faras en parolataj lingvoj", diras Senghas kaj emfazas, ke diversaj aĝ-grupoj rabotis la lingvon memstare sen scii, kiel lingvoj kutime konstruiĝas.

"Ĉi tio pravas, ke en ni estas iu mekanismo, kiu gvidas nin por disigi la elementojn de lingvo kaj por trakti ilin laŭ hierarkio. Eble precize tial estas troveblaj el ĉiuj lingvoj de la mondo samaj bazaj elementoj, kiel silaboj kaj vortoj, kaj bazaj reguloj, kiuj gvidas formiĝon de frazoj."

La rimarkaĵoj, kiujn Senghas prezentas en la gazeto *Science*, ŝajnas solvi la eternan disputon de lingvosciencistoj pri tio, ĉu nia lingvoscio je sia bazo venas el biologio aŭ el kulturo. Senghas tamen rifuzas la rolon de arbitracianto. "Mi ne asertas, ke ni naskiĝas kun universala gramatiko en niaj cerboj. Mi nur diras, ke je iuj partoj niaj lingvaj kapabloj estas denaska talento."

(el gazeto *Tiede tradukis mm*)

ludoj... Nulaj komencantoj ne estas akceptataj!

Aliĝkoto por Finnlando ĝis 1-a de marto 15 EUR, surloke 30. Kontribuantoj al la programo havas rabaton laŭ interkonsento.

Volodimir HORDIJENKO, p.k.35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio. Telefono: (044)295 1701. Retpoŝto: <volodimir_h@ukr.net>. Retpaĝo: <www.aromajalta.by.ru>

La duan informleteron ricevos aliĝintoj.

BB3 (Buse al Baltio) – pliaj informoj

Karavano al la 90-a UK en Vilno somere 2005

Karavaani Vilnaan! Bussilla Baltiaan (BB3) – lisätietoja

Karaj eblaj karavananoj!

Ĝis nun dudeko da personoj provizore mont-ris intereson por komuna busvojaĝo al la venontjara UK en Vilno. Nia karavangrupo ricevis ankaŭ interesajn proponojn por la itinero, kiujn ni pli trastudas. Momente ni havas oferton de Suomen matkatoimisto/Etumatkat, surbaze de kiu ni planas la karavanon. Jen informoj pri ĝi.

Hei kaikki Vilnan karavaanista kiinnostuneet!

Tähän mennessä noin 20 henkilöä ilmoitti kiinnostuksensa yhteiseen bussimatkaan, joten työryhmämme jatkaa matkan suunnittelua. Olemme saaneet ehdotuksia matkareitiksi ja tutkimme myös mahdollisuuksia niiden toteuttamiseen. Tämän hetkisen suunnittelun pohjana on kuitenkin Suomen matkatoimiston/Etumatkojen tekemä tarjous. Tässä siis tämänhetkinen matkasuunnitelma.

22.7. Helsinki-Tallinn per Tallink, daŭro ĉ. 2 horoj (ekzakta horaro ne ankoraŭ fiksita). De la haveno ekveturo per estona aŭtobuso. Survoje ni haltas en konvenaj lokoj. Hki-Tallinna Tallink-laivalla, matka keŝtää noin 2 tuntia (tarkempi aikataulu ei vielä tiedossa). Satamasta lähdetään matkalle virolaisella tilausajolinja-autolla. Matkalla pysähdyksiä sopivissa paikoissa.

22.-23.7. Tranokto en Jelgava. Yöpyminen Jelgavassa.

23.7. Jelgava-Vilna kun haltoj en konvenaj lokoj, en Vilna posttagmeze. Ajo Jelgavasta Vilnaan, matkalla pysähdyksiä, perillä Vilnassa iltpäivällä.

23.-30.7. Kongreso en Vilna, tranokto en centra hotelo (nomo de hotelo estos infor-

mita pli poste). Vilnan kongressi, yöpyminen keskustan hotellissa (hotellin nimi vielä auki).

30.7. Vilna-Sigulda kun haltoj en konvenaj lokoj. Ajo Vilnasta Siguldaan, matkalla pysähdyksiä.

30.-31.7. Tranokto en Sigulda. Yöpyminen Siguldassa.

31.7. Sigulda-Tallinn kun haltoj en konvenaj lokoj, en Tallinn posttagmeze por atingi la Tallink-ŝipon al Helsinki la saman vesperon.

Ajo Siguldasta Tallinnaan, matkalla pysähdyksiä, perillä Tallinnassa niin että ehditään Tallink-laivaan Helsinkiin vielä samana iltana.

Prezo 610 eŭroj/persono

La prezo inkluzivas ŝipvojaĝoj Helsinki-Tallinn-Helsinki, busvojaĝon Tallinn-Jelgava-Vilno-Sigulda-Tallinn, hotelaj tranoktoj en 2-litaj ĉambroj kun matenmanĝoj en Jelgava, Vilno kaj Sigulda. La prezo estas por grupo de minimume 20 personoj (plenkreskuloj). Se la grupo estos pli granda ol 30 personoj, la prezo malaltiĝas.

Matkan hinta 610 euroa/hlö

Hintaan sisältyvät laivamatkat Hki-Tallinna-Hki, bussimatkat Tallinna-Jelgava-Vilna-Sigulda-Tallinna, hotelliöpyymiset aamiaisineen 2-hengen huoneissa Jelgavassa, Vilnassa ja Siguldassa. Hinta edellyttää vähintään 20 matkustajaa (aikuisia, lasten hinta ei vielä tiedossa). Jos taas ryhmämme koko on yli 30 henkilöä, hintakin on edullisempi.

Se tiu plano estas en ordo por vi kiuj jam provizore aliĝis, ni daŭre havos vin en nia listo. Se ▷

vi havas aliajn proponojn ekzemple por la itinero, bonvolu kontaktiĝu kun ni. Kaj vi kiuj ne ankoraŭ eĉ provizore aliĝis, estas bonvenaj kunvojaĝi. Ni faros nun baldaŭ la provizoran mendon ĉe la vojaĝagentejo kaj fiksos la karavanon definitive en marto/aprilo post la apero de Dua Bulteno. Eblas certe partopreni nur unudirektan vojaĝon al la karavano aŭ partopreni ĝin sen tranoktoj en Vilno, por ties prezoj ni ankoraŭ devas informiĝi.

Pliaj scioj pri la karavano estos en la EAF-agadas retlisto, en sekva Esperanta Finnlando kaj dum Vintraj Tagoj de EAF.

Jos jo alustavasti ilmoittauduit ja tämä matkasuunnitelma sopii sinulle, olet jo mukana listalamme. Jos sinulla taas on muita ehdotuksia matkareitiksi, ota yhteyttä järjestäjiin. Ja jos et vielä ilmoittautunut, olet tervetullut mukaan. Teemme pian alustavan varauksen matkatoimistolle ja lopullisesti vahvistamme matkan maaliskuuhuhtikuussa, kun kongressin Dua Bulteno on ilmestynyt. Todennäköisesti on mahdollista osallistua karavaaniin vain yhteen suuntaan tai ilman majoitusta Vilnassa, kysymme myös näiden vaihtoehtojen hintoja.

Lisätietoja karavaanin edistymisestä annamme EAF-agadas -listalla, seuraavassa Esperantolehdeissä sekä liiton Talvipäivillä.

Bonvenon kunvojaĝi! Tervetuloa yhteiselle matkalle!

Por la aranĝanta grupo Tiina Oittinen, sekretario de EAF. Karavaaniryhmän puolesta Tiina Oittinen, EAF:n sihteeri.

(kontaktinformoj sur paĝo 2, yhteystiedot lehdien sivulla 2)



Cetere, se vi bezonus afiŝojn pri la Vilna UK, bonvolu kontaktiĝu kun Pentti Makkonen en Jyväskylä. Li mendis la afiŝojn de UEA kaj volonte disdonos. Lia adreso estas: Ansapolku 1, 40630 Jyväskylä kaj li estas plej bone atingebla telefone: 014-254485.

Vintraj Tagoj de EAF en Orivesi

Vintraj Tagoj de EAF alvokos nin venontfoje al Orivesi la 12an kaj la 13an de marto 2005.

La loko estas Oriveden Opisto (Orivesi-instituto), kie nun oktobre okazis la trejnseminario por aktivuloj. Orivesi estas atingebla per trajno kaj per aŭtobuso, por ambaŭ tampereanoj pretas aranĝi transporton laŭ peto.

En Oriveden Opisto ni konatiĝos kun la distancinstituto kaj alia instruado de la instituto. La urbo Orivesi invitas nin por komuna kafumado kun sciigoj pri la urbaj funkcioj kaj pri la regiono. Ĉiuj membrosocietoj de EAF havos eblecon aranĝi kunvenojn. Kompreneble ni memoros kune la faman 80an UK:n 1995 en Tampere kun bildoj, diapozitivoj, rakontoj kaj aliaj memoroj. Ĉu ankaŭ vi ĉeestis? Kaj nin ja atentos venontjare interesa karavano al la sekva UK en Vilno, pri ĝi estos ankaŭ informoj dum Vintraj Tagoj kiel nature ankaŭ pri Valamokursoj kaj pri la ĉi-jara granda esperantoevento Kultura Esperanto-Festivalo 2005. Dimanĉe estos jarkunveno.

Ni tranoktos en komfortaj 1- aŭ 2-litaj ĉambroj. Se vi interesiĝas pri amasloĝejo, bonvolu kontaktiĝi kun la aranĝantoj. Ankaŭ pri infanaj prezoj informiĝu ĉe ili.

Pliaj informoj de Vintraj Tagoj kun detala programo aperos en la unua numero de Esperantolehti 2005 en februaro. Indas jam nun aliĝi kun la plej malalta kotizo, kiu validas ĝis la 15an de januaro.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Sendu la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson <eafmendoj@esperanto.fi>. Krome pagu la kotizon kun mendita paketo al la asocia konto uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre

grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke la organizantoj sciu, kion vi mendas por la VT kaj se vi bezonos ekzemple transporton.

Kun eventualaj demandoj pri la trankoktoj, manĝoj kaj transportoj same kiel pri vojaĝebl-eco vi povas turni vin al la EAF-sekretario Tiina Oittinen aŭ al la lokaj kontaktpersonoj Markku Saastamoinen kaj Sylvia Hämäläinen. Pri programaj aranĝoj respondecas ankaŭ EAF-prezidanto Anna Ritamäki. Pri la aliĝiloj prizorgas kiel kutime Päivi Saarinen en kunlaboro kun la EAF-kasisto. Kontaktinformoj por aliaj troviĝas sur la paĝo 2, por Sylvia ili estas: Teivaalantie 85, 33400 Tampere, <sylvia.h@kolumbus.fi>, 03-3463493.

Bonvenon!

Suomen Esperantoliiton Talvipäivät Orivedellä

Vuonna 2005 tapaamme alkuvuodesta taas Talvipäivien merkeissä. Vuoden 2005 Talvipäivät järjestetään **12.-13.3. Oriveden Opistolla**, jossa lokakuussa kokoontuivat seminaarilaiset Laatu viestintään -projektin merkeissä.

Orivedelle pääsee kätevästi **sekä bussilla että junalla**: linja-autoasema on noin kilometrin päässä opistolta ja rautatieasemalle on matkaa viittisen kilometriä. Tamperelaiset ovat varautuneet kuljettamaan tarvittaessa osallistujia henkilöautoilla.

Orivedellä tutustumme niin Oriveden Opistoon kuin Oriveden kaupunkiinkin, meille on luvattu esittelyt molemmista paikoista. Oriveden Opiston yksi toimintamuoto on etäopisto ja siellä on mahdollista opiskella myös esperantoa. Kaupunki on esittelyjen lisäksi luvannut tarjota meille kahvitkin. Talvipäivien yhteydessä on kaikilla EAF:n jäsenjärjestöillä mahdollisuus järjestää omia kokouksia. Lisäksi on tiedossa kongressimuistoja vuoden 1995 kuuluisasta 80.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF en Orivesi 12.-13.3.2004.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Retadreso _____

Aliĝkotizo:

12 e ĝis 15.1.2005 _____

16 e ĝis 25.2.2005 _____

20 e ekde 25.2.2005 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

La kunvena paketo 12.-13.3. (trankokto, manĝoj laŭ la programo)

58 e dulita ĉambro _____

70 e unulita ĉambro _____

30 e nur manĝopaketo _____

(manĝoj laŭ la programo sen matenmanĝo)

Pri amasloĝejoj kaj prezoj por infanoj, bv. kontakti la aranĝantojn.

Mi venos je _____ per trajno / buso kaj bezonas transporton al la instituto.

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo **800017-230825**.

Bv. uzi la Vintraj tagoj referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarekatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

aŭ la informoj rete al: eafmendoj@esperanto.fi

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville Orivedelle 12.-13.3.2004.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Osallistumismaksu:

- 12 e 15.1.2005 saakka _____
- 16 e 25.2.2005 saakka _____
- 20 e 25.2.2005 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman osallistumismaksua ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Kokouspaketti 12.-13.3. (majoitus, ohjelmaan merkityt ruokailut)

- 58 e 2 hengen huone _____
- 70 e 1 hengen huone _____
- 30 e vain ruokapaketti _____
(ohjelman ruokailut ilman aamiaista)

Kokouspaketista lapsille ja yhteismajoituksesta lisätietoja järjestäjiltä.

Saavun klo _____ junalla/ bussilla ja tarvitsen kuljetuksen opistolle.

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Maksut EAF:n tilille: Sampo **800017-230825** käyttäen Talvipäivien viitenumeroa **4640**.

Lisätietoja tai toivomuksia:

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
tai tiedot s-postitse: eafmendoj@esperanto.fi

Tampereen maailmankongressista. Se oli meillemonille ikimuistoinen. Kongressiin tutustumme kuvien, diojen, videon sekä tietenkin juttujen ja kertomusten kautta. Toki suuntaamme jo tulevaankin: kesä 2005 on vilkas. Jo perinteeksi muodostunut Valamon kurssi on taas heinäkuun alussa. Sen jälkeen on vielä vuorossa Esperantofestarit eli KEF 2005 Helsingissä. Kuukauden lopulla lähdemme yhteisellä karavaanilla kohti ensi vuoden kongressikaupunkia Vilnaa. Talvipäivillä saat lisätietoja näistä tapahtumista. Sunnuntaina pidetään EAF:n vuosikokous.

Oriveden Opistolla yövymme mukavissa 1- tai 2-hengen huoneissa. Jos olet kiinnostunut yhteismajoituksesta, kysy siitä yhteyshenkilöiltä. Kysy heiltä myös, jos tarvitset tietoja lasten paketeista. Ilmoittaudu siis heti, edullisin ilmoittautumismaksu on voimassa tammikuun puoleenväliin asti!

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai lähetä vastaavat tiedot sähköpostilla osoitteeseen <eafmendoj@esperanto.fi>. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Käytä viitenumeroa! Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet.

Majoitusta, ruokailua sekä matkustusvaihtoehtoja koskevia asioita voit tiedustella liiton sihteerialta Tiina Oittiselta sekä paikallisilta yhteyshenkilöiltä Markku Saastamoiselta ja Sylvia Hämäläiseltä. Ohjelma-asioissa yhteyshenkilönä on myös liiton puheenjohtaja Anna Ritämäki. Ilmoittautumislomakkeista ja maksuista huolehtii tuttuun tapaan Päivi Saarinen yhteistyössä liiton rahastonhoitajan kanssa. Sylvian yhteystiedot: Teivaalantie 85, 33400 Tampere, <sylvia.h@kolumbus.fi>, 03-3463493. Muiden tiedot sivulla 2.

Tervetuloa!

Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko


16.-23.7.2004

Internacia esperantokultura festivalo en la urbocentro de Helsinko
Por ĉiuj aĝgrupoj, de beboj ĝis avoagaj kulturemuloj


En la programo estos:

- ◆ Literaturo
- ◆ Muziko
- ◆ Teatro
- ◆ Komiksoj
- ◆ Danco
- ◆ Prelegoj, kursoj, prezentoj kaj koncertoj

- ◆ **Jorge Camacho**
- ◆ Filmodoblado
- ◆ Esperanta karaokeo kun vivbando



- ◆ Dolchamar elektre kaj akustike
- ◆ **JoMo** kaj la Liberacanoj
- ◆ Esperanto Desperado
- ◆ Martin Wiese
- ◆ Komiksa ekspozicio kun Arnau Torras, Dupluströ ks.



- ◆ **Kim Henrikssen**
- ◆ "Tutvespera" esperanta opero kun Liisa Viinanen

Por pliaj programaj informoj kontaktu:

hamalainen.riitta@kolumbus.fi

dupluströ





KEF 2005, 16.-23.7.2005 en Helsinko

Aliĝilo al KEF 2005 – Bv. plenigi kaj sendi poŝte al KEF 2005, **Silta-saarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki**. La aliĝo validas post la alveno de via kotizo **al la konto de Fejo en Rauman seudun osuus-pankki, 563000-2213606**.

Sekso:

viro virino

Naskiĝdato: tt mm jjj

--	--	--

Familia nomo:

Antaŭnomo(j):

--	--

Stratadreso (nacilingve per latinaj literoj):

--

Urbo:

Poŝtkodo:

--	--

Lando:

--

Telefono: landa kodo – regiona kodo – telefonnumero

+			
---	--	--	--

Retpoŝta adreso:

_____@_____

Aliĝkotizoj al KEF 2005:

150e antaŭ 28-2-2005 170e antaŭ 31-5-2005 190e post 31-5-2005

La prezo inkluzivas manĝon kaj lokon en la amasloĝejo dum la tuta festivalo.

Speciala manĝo: vegetarana; alergioj: _____

Speciala loĝado: mi volas loĝi en dulita ĉambro en la gastejo Eurohostel kun prezo de ca. 23e (persono) po nokto mi volas loĝi en Hotel Arthur kaj petas informon pri la prezoj.

Speciala invito: mi bezonas invitleteron.

Rabatoj (indiku la validajn):

B-landana, –10e (ĉiuj landoj krom la Nordiaj landoj, EU-landoj antaŭ 2003, Svislando, Usono, Kanado kaj Japanio).

junulara, –10e (sub 30 jaroj) aŭ infana –20e (sub 13 jaroj).

Dato

Subskribo

Estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis (7/2004) en la oficejo la 11an de novembro je 11.15-16.45. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Tuomo Grundström, Taneli Huuskonen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, vicestraranoj Timo Pirinen, Eero Rinta-Karjanmaa, EAF-kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

La Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi havis entute 64 partoprenantojn. La multflanka programo ricevis dankojn kaj aprezon. La postaŭtunajn tagojn ĉe Onni Kauppinen en Iisalmi kaj ĉe Kimmo Hakala en Vesanto partoprenis dudeko da personoj. La grupo Asorti montris dum la AT videon, kiun ili faris dum ilia antaŭa vizito en Finnlando 2002. EAF ricevis la videon (en KD-formo por komputilo) kiel donacon kaj havas rajton kopii ĝin laŭbezzone. La financoj montras ioman malgajnon.

La estraro decidis, ke VT 2005 12.-13.3.2005 okazos en Oriveden Opisto kaj fiksas la kotizojn.

La estraro traktis la ĝisnunajn skizojn de Francisco Veuthey por dezajno de AKK kaj EAF. La prezidanto kun la AKK-grupo daŭrigos la planadon.

Raporto pri la trejnseminario en Orivesi-instituto aperas ĉi-numere. Al la instituto estas donacitaj Vilkki-vortaro kaj Forsman-Pyhälä lernolibro. EAF ricevis la materialon de la esperantokurso de la distancinstituto (Etäopisto/KVS-instituutti) por sia arkivo. La kurson faris la antaŭa distancinstruisto Marjatta Rautio. Raita Pyhälä estas la nuna instruisto. EAF kun ELFI pripensos eblecojn modernigi la kurson kunlabore kun la instituto.

La estraro pritraktis la raporton de la biblioteka konsilgrupo, kiu havis sian unuan kunvenon la 4an de septembro. La grupo prezentis kelkajn konkretajn proponojn kaj ideojn (ekz. bindado de la Esperantolehti-jarkolektoj, kontaktoj kun la nacia arkivo). La estraro pozitive rilatis

al la proponoj. Päivi Saarinen plu traktos pri la realigo.

La estraro informiĝis ke en Somero-biblioteko troviĝas nuntempe Esperantokolekto el la postlasaĵo de Joel Vilkki.

La estraro decidis ke EAF aĉetu la libron pri la fratoj Väisälä por la biblioteko. Olli Lehto: *Oman tien kulkijat – veljekset Vilho, Yrjö kaj Kalle Väisälä* (eldonejo Otava 2004).

La estraro pritraktis invitleteron de la FEJO-kaj EKH-prezidantoj pri Kultura Esperanto-Festivalo 2005. EAF volas apogi la organizadon de la festivalo. Vicprezidanto Päivi Saarinen estas nia KEF-kontaktulo. Taneli Huuskonen estas en la KEF-komitato.

Valamo-prospekto de Popola Instituto de Valamo aperis. La kursorespondeculo daŭrigas la kursopreparon kun la Valamo-grupo kaj la Popola Instituto kaj interkonsentos i.a. pri la kursoprezoj.

La karavana grupo ricevis oferton de Suomen Matkatoimisto/Etumatkat kaj informas pri la plano en Esperantolehti 6/2004.

La estraro decidis, ke sekvaj estraraj kunsidoj okazos laŭbezzone dimanĉon, la 16-an de januaro 2005 kaj sabaton, la 12-an de februaro 2005 je 11.00 en la oficejo.

Kompilis la prezidanto surbaze de la protokolo.

Antaŭen elektis

La elektokunvenon de Antaŭen la 15an de novembro ĉeestis 11 membroj. Por la jaro 2005 Lauri Liukkonen estis elektita prezidanto. La estraranoj estos Sylvia Hämäläinen, Veli Hämäläinen, Jukka Laaksonen kaj Markku Saastamoinen. Vicestraranoj estos Tapani Aarne, Pentti Järvinen, Anja Karkiainen kaj Terhi Laaksonen.

Sekretario

Trejnseminario por inspiri aktivulojn

La dua trejnseminario de EAF *Al kvalita komunikado* okazis sabate-dimanĉe la 30an ĝis la 31a de oktobro 2004 en Oriveden Opisto (Orivesi-instituto).

La ĉefpreleganto estis Ziko Marcus Sikosek, kiu laboras en la Centra Oficejo de UEA. Li konatigis nin kun la tiklaĵoj same de esperanto-informado kiel de arkiva organizado. Sabate-vespere la interagada programero “Esperantistoj kaj ĵurnalistoj: ĉu kolizio aŭ koalicio?” donis al ni spertojn de praktikaj situacioj. Ni dividiĝis en grupojn kun diversaj roloj: unu grupo por “la ĵurnalistoj” kaj kvar diverstemaj por la “esperantistoj” – lingvopolitiko, loka aktivado, movado, lingvolernado – preparis kaj realigis “intervjuojn”. Rezultis diversaj imagitaj tekstoj,



Ziko instigis nin koni la faktojn kaj rigardi al la esperantoferoj el ekstera vidpunkto. Fone “artikoloj” kaj aliaj raporto de la antaŭaj gruplaboroj.

sed ĉefe bazo por komuna diskuto pri la diversaj roloj kaj temoj, kiujn indas atenti kiam ni rilatas al amaskomunikiloj.

Jouko Lindstedt prezentis la mondan rolon de la angla komparante la argumentojn por kaj kontraŭ kun komparoj al la argumentoj prezentataj en la esperantomovado. La angla – neŭtrala lingvo! La angla lingvo – savanto por la malgrandaj lingvoj! Por prezenti tiajn sloganojn oni ne devas esti ŝerculo aŭ intenca trompanto. Dependas de la vidpunkto. Neŭtrala kompare al kio? Malpli minaca kompare al kio? Rekomendindaj kiel legaĵoj por esperantistoj estas ne nur la kritikaj libroj, kiel *Ĉu nur-angla Eŭropo?* de Robert Phillipson (English-Only Europe?), libro kiu ne nur estas tradukita esperanten, sed ankaŭ pozitive rilatas al esperanto. Por kompreni la debaton gravas legi ankaŭ aliajn vaste rekonatajn tekstojn en la angla, ekzemple *English as a Global Language* de David Crystal.

Partoprenis en la dua trejnseminario de AKK-projekto en Orivesi entute 29 personoj. ● Prelegantoj: Ziko Marcus Sikosek, Jouko Lindstedt ● Organizantoj de EAF-estraro/AKK-projekta grupo: Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen ● EAF-estraro: Raita Pyhälä, Timo Pirinen, Eero Rintakarjanmaa ● AKK-projekta grupo: Jukka Pietiläinen ● E-lehti: Mikko Mäkitalo ● ELFI: Carola Antskog, Sylvia Hämäläinen, Erkki Kempainen ● FEJO: Patrik Austin, Riitta Hämäläinen, Katja Lampinen, Paula Niinikorpi ● E-klubo de Jyväskylä: Pentti Makkonen ● E-klubo de Lahti: Vilorg Teräväinen, Börje Eriksson ● E-klubo de Helsinki: Taneli Huuskonen, Tuula Virolainen ● E-klubo de Salo: Matti Wallius ● E-societo Antaŭen, Tampere: Jukka Laaksonen, Katriina Muurainen-Särkkä ● E-societo, Turku: Jorma Ahomäki ● E-grupo de Lappeenranta: Irja Miettinen, Marja-Liisa Kettula

La distancinstituto de Kansanvalistusseura KVS havas sian administrejon en Oriveden Opisto. La direktoro pri edukado Eija Assola-Virta de la distancinstituto prezentis la instituton al la partoprenantoj kaj rakontis kun Raita Pyhälä pri la esperanta distanckurso. Kutime estas 2-3 lernantoj jare. Gravus eltrovi eblecojn modernigi ĝin. Alie ĝi minacas malaperi.

Fine ni kolektis ideojn kaj informojn pri nunaj agadoj. Kvankam ni ne disponis pri multe da tempo por tiu grava parto de la seminario, ni tamen malfermis la debaton por posta daŭrigo. La ĉefa celo de la trejnseminarioj estas doni inspiron kaj instigon al niaj aktivuloj. Aparte ni

substrekas la eblecon partopreni per agadoj en A1 kvalita komunikado laŭ la gvidlinioj publikigitaj en n-ro 4/2004. Ĝuste nun indas pripensi agadojn por altigi la kvaliton de nia informado. La AKK-projekto daŭros ankoraŭ nur iom pli ol unu jaron.

La ideinterŝanĝon ni daŭrigas sur la paĝoj de Esperanta Finnlando (ekz. en la formo de la teksto de Vilorg Teräväinen en tiu ĉi numero) kaj en la retlisto EAF-agadas. Ĉi-gazete ni publikigas ankaŭ kelkajn ideojn prezentitajn de Saliko en EAF-agadas. Reagoj bonvenas diversvoje.

Anna Ritamäki

El gutoj fariĝas riveroj

Ĉu eblas zorgi pri tio ke ĉiu biblioteko havu ian nuntempan lernolibron pri Esperanto kaj vortaron? (Ĉu VI persone povas donaci? EAF ne kapablas.) Ĉiu “bona” librovendejo devus havi almenaŭ unu lernolibron. Se niaj finnaj libroj estas tro modestaj, oni povus provi enŝovi “Teach Yourself Esperanto”, Mazi aŭ laŭ via prefero. (Ĉu vi persone vizitu kaj priparolu la aferon en VIA librovendejo?)

Vi diras, ke la bibliotekoj kaj vendejoj mendas SE IU DEMANDAS. Ho, tio ne estas la sama. Estas kvazaŭ niaj lerniloj kaj nia lingvo estus danĝeraj kemiaĵoj, kiujn oni gardas en ŝlositaj ŝrankoj kun bildo pri kranio kaj ostoj sur la pordo. Eble iu kiu ŝatus scii pri Esperanto sentas sin tiel malcerta ke dezirus nur iom trarigardi la libron, ne mendi tuj. Precipe en urboj kaj kampare, kie ne aktivas espistoj, la unua problemo estas trovi lernolibron aŭ eĉ iam renkontiĝi kun la vorto “Esperanto” en situacio, kie oni povus tuj konatiĝi kun ĝi.

Alia propono: *La AKK-laborgrupo kolektu frapfrazojn kaj faktojn kaj sendu al ni ĉiuj, por ke ni sciu, kion diri pri Esperanto, se iu demandas/intervjuas. Se la unua demando estas “Kio/Kia lingvo estas E-to?”, ĉu ni respondu planling-*

vo, artefarita l., konstruita l., internacia l. aŭ kion? En la seminario iu proponis, ke ni havu oficialan informiston por tio. Tamen ni homoj parolus preter li/ŝi. Ni eĉ ne sekvus kaj obeus la rekomendojn de la ne ankoraŭ ekzistanta kolekto, kiun mi petas de la laborgrupo. Malgraŭ tio mi ŝatus havi “oficialajn” konsilojn por iom unuecigi la hazardan informadon.

Leterpapiroj, kovertoj kaj glumarkoj estas dezirindaj sed tro longe daŭras jam tie preparado. Ĉu ĉiu el ni faru malsamajn por si mem? Estus pli bone havi komune uzeblajn, aĉeteblajn de EAF. Ĉar la vorto “esperanto” ankoraŭ restas nekonata, estus bone aperigi ĝin plej eble ofte kiel instigilon por scivolemo.

Mi deziras tikli vian cerbon por havi reagojn kaj rezultojn, ne tuj grandajn sed pogute. Se ni tro longe nur cerbumas kaj ludas, neniam konkretaj rezultoj estiĝas. La nova arĝenta broĉo estas unu bona konkreta gutto, dankon.

Saliko

(Eroj el mesaĝo aperinta en EAF-agadas)

EAF-agadas estas retlisto pri agado en kaj por Esperanto en Finnlando. Se vi estas membro de EAF kaj deziras aliĝi, bv. kontakti la prezidanton: eaaprezidanto@esperanto.fi.

Loko de Esperanto en konkurenco de la lingvoj

Estante arda adepto de Esperanto, mi neniam antaŭe havis feliĉon partopreni tiom signifan kaj interesan seminarion, kiel tiun okazigitan de EAF enkadre de la projekto "Al kvalita komunikado" 30-31 oktobro en la urbo Orivesi.

Sed ne sole la temo interesis min. Estis interese interŝanĝi opiniojn pri la lingvo kaj konatiĝi kun imitinda maniero de komunikado, kiun montris la reprezentanto de UEA Ziko Marcus Sikosek. Lia konduto kaj sinteno estis senriproĉaj. Li montris sin saĝa kaj lerta organizanto kaj samtempe diskreta homo. Li neniun lasis sen sia atento kaj neniel substrekis gravecon de propra partopreno en la seminario.

Ni havis eblecon vidi, ke Ziko kolektis multajn interesajn faktojn pri historio de la movado, kaj multajn opiniojn koncerne de Esperanto kaj ties loko meze de aliaj lingvoj. Persone mi neniam havis eblecon partopreni iun ajn internacian kunvenon. Do min pli multe interesis beleco de lia lingvouzo, kaj opinioj pri stato kaj rolo de la lingvo. Tamen, bedaŭrinde, mankis tempo por pli longa pridiskuto de interesaj apartaj trajtoj de la lingvo, kiuj povus provoki intereson al Esperanto ne sole flanke de la homoj jam parolantaj kaj dezirontaj uzi ĝin en sfero de internacia komunikado. Mi opinias, ke pridiskutindaj estus la demandoj:

- Ĉu la lingvo povas esti konsiderata vivulo? (ĉu ĝi havas animon?)
- Ĉu inter la lingvoj estas samtempe kunago kaj interkonkurenco?
- Ĉu Esperanto estas ilo en la manoj de la homoj, aŭ male?
- Ĉu Esperanto povas fariĝi internacia sen antaŭe fariĝi nacia?
- Ĉu Esperanto havas trajtojn, kiuj farus ĝin dua (aldona) lingvo de la nacio?

Vidpunkton de la homoj, kiuj strebas solvi teknikan problemon de tradukado, oni povas kompreni tiel, kvazaŭ tiuj opinias lingvon esti lingva kodo, siaspeca nacia vestaĵaro, destinita por vesti pensojn. Laŭ tiu vidpunkto, la homa penso povas esti vestita jen en vesto de unu nacio, jen en vesto de la alia. Do, por solvi la problemon estas bezonata nur sufiĉe ampleksa gardero kaj scio pri naciaj manieroj sin vesti.

Laŭ alia vidpunkto, la lingvo estas kreskaĵaro, kiu nedeŝireble teniĝas sur grundo de la nacia kulturo. Laŭ tiu opinio, ne estas eble krei teknikan tradukilon. Ili preferas nomi sole Esperanton lingva kodo, sed ne aliajn lingvojn.

Tamen, kio estas kulturo, kaj kiamaniere kun ĝi estas ligita la lingvo?

En la seminario spontane okazis diskuteto ĉirkaŭ natureco/artefariteco de Esperanto, kaj evidentiĝis ke la nocio "kulturo" estas komprenata de la partoprenantoj tre malsame. Tamen, ŝajne, ĉiujn kontentigis klarigo fare de gvidanta seminarion EAF-estro. Ŝi eldiris penson, ke kulturo estas tio, kio apartigas la homon de la aliaj vivestaĵoj. Kaj tiu vidpunkto aŭtomate montris, ke Esperanto estas viva (natura) lingvo, baziĝanta sur la kulturo. Esperanto ja vere baziĝas sur tio, kio faras homon la homo.

Tamen komparinda estas ankaŭ Esperanta diferenco de aliaj lingvoj.

Nacia lingvo ja vivas longan vivon kaj heredigas kulturon de la popolo ne sole forme de tekstoj. Forme de vortoj kaj frazoj en ĝi akumuliĝas sistemo de valoroj de la nacio kaj aparteco de tiu pensmaniero. Kaj ĉio ĉi perdiĝas post traduko de la teksto en alian lingvon. (Restas sole origina informo de tradukata teksto). Kaj sole bona tradukisto kapablas meti en tradukaĵon animon, kiu similas al origina.

Ankaŭ Esperanto havas propran animon, kiu pli aŭ malpli similas animon de aliaj naciaj lingvoj. Sed, diference de la aliaj lingvoj, Esperanto havas rimedojn, kiuj laŭbezone, ebligas kompreni, aŭ eĉ montri animon de alia lingvo. Kaj nome tiu ĝia trajto faras ĝin unika interlingva ponto por akiri konon de unu, aŭ kelkaj novaj lingvoj.

La seminario ankoraŭ foje konvinkas, ke esperantistoj, bedaŭrinde, ofte elektas ne la plej bonajn rimedojn agiti por Esperanto. Ĉu al homo, kiu bone vidas potencon, ekzemple, de angla lingvo, estus sufiĉaj argumentoj “por kaj kontraŭ”. Homoj pli multe bezonas vidi realajn atingojn de la lingvo. Kaj la plej bona rezulto atingebus, se Esperanto fariĝus aldona (helpa)

lingvo, trovinta apartan lokon apud nacia role de aldona (helpa) lingvo. Memkompreneble, ke tio ne povas esti la loko de altkvalita komunikilo. Tiun lokon firme okupas la denaska lingvo (la lingvo kun nacia animo). Sed tio povas esti loko de rimedo, destinata por vidi denaskan kaj ankaŭ instruatan/lernatan lingvojn de ekstera (de neŭtrala) vidpunkto. Supozeble tia uzo montros la tutan potencon de Esperanto. Sed nuntempa uzo de la lingvo en simplaj internaciaj rilatoj ne ofte postulas eĉ bonan konon de la lingvo. Ĉu indus preparoli tiujn ĉi problemojn de la lingvo en pli larĝa, ol estas nia, rondo?

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 C 45, 15800 Lahti. Tel. 03-7343978. vilorg@phnet.fi



“Esperantistoj kaj ĵurnalistoj: ĉu kolizio aŭ koalicio?” Jen dum tiu interaga progremero Vilorg Teräväinen, starante dekstre, kaj Taneli Huuskonen kiel ĵurnalistoj faras intervjuon pri lingvopolitiko kun Pentti Makkonen kaj Jukka Pietiläinen. Fone okazas intervjuo pri loka agado, videblas Mikko Mäkitalo, Erkki Kemppainen kaj Eero Rinta-Karjanmaa. (Foto: Ziko)



Petri Tuovinen.

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 13an de marto 2005 je la 10a horo en Oriveden Opisto (Orivesi Instituto), Koulutie 5, Orivesi. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina 13.3.2005 klo 10.00 alkaen Oriveden Opistolla, Koulutie 5, Orivesi. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Finlands Esperantoförbunds stadgeenliga årsmöte hålles söndagen den 13.3.2005 kl. 10.00 i Oriveden Opisto, Koulutie 5, Orivesi. Mötet behandlar de i förbundets stadga föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro – Hallitus – Styrelsen

Aŭtunaj aranĝoj en Jyväskylä

La unuan fojon en nia kluba historio ok esperantistoj el Mikkeli kaj Jyväskylä spertis esperantlingvan semajnfinan tajĝi-kurson en oktobro. La tradician ĉinan gimnastikon, kiu fortigas kaj fizikan kaj psikan sanon, instruis al ni lerte juna esperantisto Petri Tuovinen el Lahti. En lia gvidado ni ekzercis bazajn movojn kaj movseriojn. Li rakontis al ni ankaŭ pri lia unua Esperanto-kongreso en Pekino kaj pri la dumkongresa tajĝi-kurso, kiun li partoprenis.

Vespere la partoprenantoj vigle diskutis i.a. pri diversaj manieroj zorgi pri sia sano kaj kiel manĝi sanige. La familio Laamanen donis al volontuloj energioflegadon.

En la semajnfino 13.-14.11. – post multjara paŭzo – estis aranĝita sukcesa esperantokurso por komencantoj. La dekhoran kurson partoprenis sep plejparte junaj personoj kaj ĝin gvidis entuziasme kaj talente Raita Pyhälä. La kursanoj tiel multe interesiĝis pri la lingvo, ke komence de la venonta jaro estos aranĝata aparta studrondo por ili. Kelkaj intencas lerni esperanton vere diligente, ĉar ili volas partopreni la esperantokongreson en Vilna venontsomere.

Seija Kettunen

Aktivigo en Somero

Esperantoklubo de Salo aktiviĝis ĉi-aŭtune per prelego kaj ekspozicieto en Somero. La biblioteko posedas la kolekton de esperantolibroj, kiujn posedis siatempe Joel Vilkki. La libreton meze de la bildo kun lia ekslibriso oni eldonis en 1999 memore al la 100-jara naskiĝtago de Vilkki. Post lia morto en la jaro 1976 lia filino Heljä Favén pretigis lian novan vortaron.

Sekve de la prelego kaj vizito en la gimnazio en Somero, Kiiruun koulu, komenciĝis la 15an de novembro nova kurso por komencantoj. Ĝin partoprenas 18 lernantoj, plejparte gimnazianoj.

Carola Antskog

Fabelkonkursoj de Päätalo-Instituto

La 18-an de oktobro 2004 okazis en Taivalkoski la evento kie oni publikigis la premiitojn de finnlingva kaj esperantlingva fabelkonkurso aranĝitaj de Päätalo-Instituto. La premion "Napero Finlandia" gajnis Niina Pelkonen de Kii-minki. La premion "La Fabelo Internacia" gajnis Karina MacGill de Hungario. Venis 900 fabeloj al finnlingva, dek al esperantlingva konkurso.

La rezultoj de ĉi-jara fabelkonkurso:

Kategorio A:

1. Konkursfabelo el Fora Nordo: Monika Goralczyk, Pollando
2. Pri perdita hundeto: Denisa Pavlasova, Ĉeĥa Respubliko
3. Fabelo 2: Monika Goralczyk, Pollando

Kategorio B:

1. De la mallumo al la lumo: Francesco Bentivogli, Italio
2. Leontodo kaj formiko: Dinara Buzanakova, Rusio
3. Sorĉa fungo: Ramil Kosbiev, Rusio

Kategorio C:

1. Makulul: Karina Macgill, Hungario
2. Kiu forrabis epifanian feiron?: Silvio Ravaioli, Italio

Aini Vääräniemi

Eventokalendaro de EAF 2005

12-13.3.05 Vintraj Tagoj en Orivesi

4-8.7.05 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

16-23.7.05 Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko (FEJO)

23-30.7.05 U. Kongreso en Vilno, Litovio (UEA), karavano planata de Finnlando

31.7.-7.8.05 Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, Pollando (TEJO)

septembro 2005 Aŭtunaj Tagoj kiel ekskurso al Esperantodomo en Lesjöfors, Svedio

Datoj de EAF-laborkunvenoj

11.12.04 Projekta grupo de Al kvalita komunikado

16.01.05 kaj 12.02.05 EAF-estraro

13.03.05 EAF-jarkunveno



Esplorado pri historio de FEJO

FEJO lastvintre komencis verki sian historion. Nia celo estas publikigi ĝin en formo de libro plej laste por jaro 2007, kiam samtempe okazos 30-jariĝo de FEJO kaj 100-jariĝo de EAF.

Ĝis nun ni ordigis arĥivajn materialojn kaj skribis koncizan bazan kronologian tekston pri FEJO. Estas konstatite, ke plejparto de la protokoloj kaj aliaj gravaj paperoj de FEJO ekzistis konservataj en la oficejo de EAF kaj ĝia stokejo, kvankam bezoniĝis iom da serĉado kaj ordigado. Tamen mankas kelkaj. Pro tio ni nun petas eksajn aktivulojn de FEJO kontroli siajn proprajn stokojn de FEJO-paperoj pri la sekva listo. Se vi trovos ĉe vi la dokumentojn, bonvole sendu ilin al mia suba adreso. Se vi volas vian paperon reen, menciu tion, tiam ni nur pruntas la paperojn kaj laŭ bezono kopios kaj resendos vian originalon. Se vi ne petas resendon, ni konsideros ke vi donacas la paperon al arĥivo de FEJO.



FEJO-aktivuloj (Mikko Mäkitalo, Paula Niinikorpi, Timo Pirinen) en Turku.

● protokoloj de jarkunvenoj: mankas de jaroj 1990 kaj 1994 ● agadraportoj: mankas de jaroj 1983, 1984, 1994, 1995 ● agadplanoj: mankas de jaroj 1978, 1984, 1985, 1995 ● FEJO-Bultenoj mankas la sekvaj: ■ 3/80 ■ de jaroj 1983 kaj 1984 ĉiuj krom la unua (se estis faritaj pli ol unu) ■ de jaro 1985 ĉiuj, se estis faritaj ■ 1/92 ■ de jaro 1994 ĉiuj krom la unua (se estis faritaj pli ol unu) ● Kvinpinto-gazeto, la komuna membrogazeto de la nordiaj junularaj Esperanto-organizoj, estis farita dum jaroj 1985–2002. Mankas la sekvaj: ■ 5/90 kaj 6/90 ■ 3/91 kaj 6/91 ■ 2/93, 3/93 kaj 4/93 ■ ĉiuj numeroj de jaroj 1994–2001. (Dum tiuj jaroj FEJO-anoj ne ĉiam ricevis la gazeton, ĉar FEJO intertempe ne aktivis.)

Krom la supra listo mi petas ĉiujn eksajn FEJO-aktivulojn serĉi bonajn fotojn pri FEJO-aktivaĵoj kaj elpensi bonajn anekdotojn pri okazaĵoj. La plej gravajn eksajn FEJO-aktivulojn mi kontaktos aparte por intervjuo. Se vi pensas vin esti grava FEJO-aktivulo, kiun mi forgesis kontakti, vi kontaktu min.

*Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie
41 as. 9, 20540 Turku. Tel. 02 2373 848*

Okazos baldaŭ...

12.1.2005 Diskoopera gigo de Dolchamar en Helsinko. Rokklubejo Semifinal, Urho Kekkonen katu 6.

12.-13.2.2005 FEJO-semajnfino en Helsinko
i.a. jarkunveno de Fejo

23.-29.3.2005 IJF en Italio

FEJO sendas du sub 30-jarajn esperantistojn al la Internacia Junulara Festivalo. La edukministerio de Finnlando pagos ĉiujn kostojn de la partoprenantoj.

Se vi volas partopreni, kontaktu sekretarion Katja Lampinen: katja.lampinen@suomi24.fi, 040 523 6076. La 29-a IJF okazos en Jesolo.

Lempiasioita – Am-aferoj

Fejolaiset kertovat
lempiasioistaan.

Koonnut: Katja Lampinen.



Mia plej amata hobio

Riitta Hämäläinen

Mia plej amata hobio estas dancado. Nuntempe mi uzas 6-8 horojn ĉiusemajne en danclecioj.

Unue, dancado post labortago estas bonega maniero malplenigi sian kapon de laboraj pensoj kaj forĵeti eventualan streĉon. Due, estas bona maniero iom gardi sian fizikan kondiĉon, ĉar en multaj dancoartoj oni uzas la muskolaron de la tuta korpo. Ankaŭ multe pli amuze kaj utile ol ekzemple aerobiko aŭ kurado: oni ja lernas en lecionoj ne nur ŝviti, sed ion kion oni povas efektive uzi poste. La rezultoj de la hobio ankaŭ klare videblas post mallonga tempo. Se la pelvo aŭ la ŝultroj ankoraŭ ne mole moviĝis en komenco, la diferencon oni vidas propraokule jam post kelkaj monatoj. Premiige.

De infanaĝo ĝis nun mi jam provis plurajn dancoartojn dum pli kurtaj kaj longaj periodoj: popoldancon, argentinan tangon, stepadon, diskoon, flamenkon, valson, ĵiveon, latinhiphpon, modernan dancon ktp, sed la plejan amon mi trovis en salso kaj aliaj latindancoj. En salso min allogas jam la muziko mem (t.e. vera salsomuziko kaj son-muziko, ne rikimartineca latinpopo), kiu estas fascina kombinaĵo de gajo kaj leĝero, profunda tristo kaj flama pasio. En pluraj Kubodevenaj muzik- kaj dancoartoj ankaŭ la ritmo estas multe pli malfacila, kaj tiel alloga, ol en niaj tradiciaj finnaj dancoj.

Salson oni povas danci aŭ sole aŭ pare. Kunpara salso estas tamen, laŭ mi, pli bona kaj ankaŭ pli malfacila versio de salso. Ne sufiĉas, ke mi mem scipovas la movojn kaj la paŝojn kaj la turniĝojn. Oni devas kunlabori, trovi komunan manieron moviĝi kaj atenti unu la alian. Eĉ se estus du personoj, kiuj jam de longe dancis, foje simple ne troviĝas komuna movĥemio kun la paro – simile kiel ne ekzistas interpersona parolĥemio inter ni ĉiuj. Por mi la plej malfacila afero en dancado estas lasi min esti "la pasivulo", kondukita de alia persono, kiel ja nepras en pardancoj. Do, dance oni eĉ lernas ion pri si mem.

Lukijakilpailu

Mitä yhteistä on Suomen Pankilla, Helsingin yliopistolla, Sosialidemokraattisella puolueella, suomalaisella vapaapalokuntaliikkeellä ja FEJolla?

Lähetä vastaus allekirjoittaneelle. 15.1. mennessä oikein vastanneitten kesken arvotaan oikeaan vastaukseen liittyvä palkinto.

Mikko Mäkitalo

▷ Ĉefa temo estas "Homaj rajtoj kaj lingva interkompreno". TTT-paĝoj de IJF: <http://iej.esperanto.it/ijf/>

Plej certe vi nenion gravan maltrafos, se vi regule sekvas la retliston. Se vi ne jam aliĝis, eblas ja facile korekti ĉi-mison. Sendu malplenan mesaĝon al la adreso:

fejo-subscribe@yahoogroups.com

Muut lehdet

Kuusamossa ilmestynyt Koillissanomat esitteli lokakuun 1. päivänä ”Esperantometsässä” -ot sikolla Taivalkosken peruskoulun 5-luokkalaisten opintoretkeä, joka suuntautui Taivalkosken Metsäkylään. Toisena oppaana paikan päällä toimi Aini Vääräniemi, joka näytti esperantometsän erään salaisuuden eli esperantonkieliset eläinhahmot ja kertoi yleensä kielen perusteista. Oppilaat kävivät myös kylän savipajalla, Halkolan museotilalla sekä Välijoen varrella uitto- ja myllymuseossa.

Kainalojuttuna Aini Vääräniemi kirjoitti Zamenhofin työstä esperanton perustajana sekä kielen harrastajien kielensä kautta syntyneestä omasta elämäntavasta, esperantistien suuresta perheestä. Jutussa esitellään Pasporta Servon majoitustapa ympäri maailmaa, maailmankongressi, joka on seuraavaksi Liettuassa sekä mainitaan Suomen esperantoliiton syys- ja talvipäivät.

Järvenpöyläisen Antero Harjun kirjoitus esperantosta julkaistiin Kansan Uutisten ja Keski-

Uusimaan mielipidepalstalla 20.10.2004. Kirjoituksen lähtökohta oli syyskuun lopussa vietetty Euroopan kielten päivä ja EU:n massiivinen 20 virallisen kielen tulkkaukskoneisto.

Harjun mielestä Suomen koululaitos on liiaksi antautunut englannin kielen ylivoimaiseksi ja ei etsi sille vaihtoehtoja. Esperanto voisi olla sellainen, hän kirjoittaa.

Hän esitteli Someron keskikoulussa 1950- ja 60-luvulla tehtyä vertailua, jossa koulun esperanton lukijat oppivat kielen selvästi nopeammin kuin englannin kielen lukijat oman kielensä. Esperanton tulisi olla kouluissa ensimmäinen pakollinen kieli Anteron mielestä. Se toisi säästöjä opetukseen.

Jos ja kun Esperantosta tulisi YK:n ja EU:n virallinen kieli, niin se tulisi ottaa myös Suomessa viralliseksi kieleksi.

Kiinassa tuetaan Harjun mukaan esperanton opetusta suhteellisen hyvin siksi, että se antaa vaihtoehdon englannin kielen ylivoimalle.

Jukka Noponen

Karjalan kielestä

Arvoisa Mikko Mäkitalo, Mielenkiintoinen artikkelinne Esperantolehdesssä 5/2004 otsikolla ”Karjalako takaisin? (Ja keneltä kenelle?)”. Puuttumatta varsinaisesti tuohon minun silmiini pisti artikkelissa kohta, jossa sanoitte ”...sen jälkeen kun Karjalan kannaksen suomenkielinen väestö evakuoitiin...”. Eihän luovutetulta alueelta evakuoitu pelkästään Kannaksen *suomenkielistä* väestöä, vaan useampi kymmentuhatta *karjalankielistä* ihmistä ns. Laatokan Karjalasta. Sieltä tuli ent. Salmin, Pitkärannan, Impilahden ja Suistamon pitäjistä livvin puhujia ja Suojärven, Soanlahden jne pitäjistä etelä-(eli varsinais-)karjalan puhujia. Näiden ihmisten kielellisistä oikeuksista ei huolehtinut valtiovalta eikä kukaan muukaan taho,

vaan nämä ihmiset pakkosuomalaisistettiin (osa uskontoa myöten).

Tänä vuonna Opetusministeriön toimeksiantosta on Joensuun yliopisto (tutkija Matti Jeskanen) suorittanut tutkimuksen Suomen alueella olevista karjalankielen käyttäjistä ja heitä on vielä hieman yli 5000 henkeä, jotka puhuvat livvia tai etelä-(varsinais-)karjalaa. Ja lisäksi löytyy vielä jonkin verran vienankarjalan puhujia parista vienalaisykylästä itärajamme. Karjalan kielihän muodostuu neljästä murteesta (siis karjalan kielen murteesta) livvi, lyydi, etelä-(eli varsinais-)karjala ja viena.

On surullista tänä päivänä huomata, kuinka oma äidinkieli on saanut kuihtua, kun ympäristön paineen takia sen käyttöä eikä opetusta ole

ELFI informas

Novaj membrokotizoj

Pagante memoru mencii la simbolon:

MIPR: 26 eur inkluzivas IPR:n papere.

MJA: 26 eur inkluzivas IPR:n rete kaj Juna amikon papere.

MI: 13 eur inkluzivas IPR:n interrete.

Interligilon ricevas ĉiu membro. IPR = Internacia Pedagogia Revuo.

La kontonumero estas sur la antaŭlasta paĝo.

Informantoj

Se vi informas pri la internacia lingvo kaj Euro-scola en iu gimnazio aŭ al samaĝaj lernantoj en alispeca lernejo, kontaktu Carola Antskog por ricevi etan monhelpon.

*Estraro (la informon sendis
Sylvia Hämäläinen)*

▷ osattu vaalia, tuon suomalaisten mieliin luterilaisen kirkon iskostaman vuosisataisen venäläisyysvihan vuoksi. Vielä minun lapsuudessaani ja jopa tältä vuodelta on kokemus tuosta vihasta. Nyt vanhoilla päivilläni en enää välitä, vaan olen alkanut käyttämään äidinkieltäni tämän pakko suomen sijaan siellä missä luulen tulevani ymmärretyksi, enhän ole suomalainen vaan karjalainen..

Valtiovaltakin on perustuslaissaan (minä en tunne sitä omakseni) asettunut vain romanien ja saamen kielen puoltajaksi. Kuitenkin suomalaisten ns. kansalliseeposkin on karjalaisilta varastettu! Enkä ole ainoa karjalainen kuin näin ajattelee.

Miksi minä näin kirjoitan esperantolehdele? Siksi, että esperantistienkin keskuudessa on niitä, joilla on yhteiskunnassa ja poliittisestikin asema, jossa he voisivat tehdä oman kielensä eteen suuria palveluksia. mutta he häpeävät ”omaa” kieltään eivätkä pidä sitä esillä muuta kuin omassa piirissämme.

Karjalaisittain ”Omua ei pie brakuijja!” (Propran oni ne devas malsati!). *Matti Saveljev*

Verda stelo

*Julfestulo vojaĝas,
sub la arboj,
trans la riveron,
laŭ vojo,
al infanoj....*

– Haltu!! Petteri, mia fiedela boaco, haltu. Rigardu, tie estas dometo. Ĉu vi memoras, kiuj vivas tie? Jes, Henna kaj Jesse.

*Tri foje,
Julfestulo frapas,
al la pordo,
baldaŭ infano,
malfermas tion....*

– BONAN JULFESTON Jesse! Kaj ankaŭ al vi, Henna. Kio nun? Kial vi ploras? Nun estas julo.

– Kiu tie estas?

– Julfestulo.

– Eble li kapablas helpi nin. Jesse, demandu!

– Julfestulo, ni havas prob.... problemo....

– Problemo, dum la julo?

– JES, sinjoro Julfestulo!

– Kian problemon vi havas?

– Venu, Jesse kaj Julfestulo, mi montras tion.

– Rigardu Julfestulo!

– Kion, mi ne komprenas.... ĉi tie estas julpiceo kun ornamaĵoj, kandeloj, mangaĵoj. Mi ne vidas, kio estas via problemo?

– Rigardu Julfestulo, ni ne pretigis stelon al supro de la piceo. Ĉu vi, bona Julfestulo, kapablas helpi?

– Hmmm... Nun estas julo, mi esperas, ke unue vi venus kun mi al arbaro, ĉar mi volas doni julfeston ankaŭ al bestoj de arbaro. Mi havas ankaŭ donacojn al bestoj.

– Jes, Julfestulo, ni helpas vin. Ĉu ne Jesse?

– Jes, sed ni ne havas stelon.

– Forgesu tion nun, ĉar Julfestulo iras jam.

– Mi havas tri sakojn, unu al mi, unu al vi Jesse kaj u....

– Unu al mi!

– Ĝuste Henna.

Bonegaj infanoj. Sed ili estas malfeliĉaj, ĉar ili ne havas la stelon. Mi volus helpi ilin, sed kiel?

– Jesse, ŝnurligu garbojn al arboj. Henna, lasu la ▷

Memortago de Kalocsay en Felsöpakony

la 9an de oktobro 2004

Anja Karkiainen

*Jen sekvas pala raporteto
pri memortago de poeto,
omaĝ' al granda Kaloĉajo.
Vilaĝlerneje regis gajo,
dum gvidis sinjorino Szabo
kun sia familia stabo
aranĝon ravan transsupoze,
tro belan por priskribi proze.*

*Programon preskaŭ nur hungare
ni ĉiam povis sekvi klare
pro interpreto kaj ekspliko
de lerta Molnár Ludoviko
per frazoj sen stumblado, kripla
- de Baghy estis li disciplo!
Kun Kalocsay li kunlaboris,
dum fest' pri ambaŭ rememoris.*

*Mirinde vigla elokvento
montriĝis en la sinprezento
de diverslokaj kluboj, centroj.
Kaj intertempe al la ventroj
jam preskaŭ ekminacis kredo
pro fruktoj, kukoj kaj ricevo
de gulaŝ-suppo ege bona
kaj vino Eger-regiona.*

*El tuta lando homoj venis,
Je tio nur malmulte ĝenis,
ke iom ruiniĝis planoj
atesti al la vilaĝanoj
ke vere vivas Esperanto,
ĉar venis nur malgranda kvanto.
Ne tamen temis pri protestoj,
sed tri samtempaj nuptofestoj.*

*Multflankaj estis tiuj horoj.
Ni aŭdis kantojn de du ĥoroj;
de knabinejoj voĉoj puraj
kaj de virinoj jam maturaj.
Muzikis band' "Mustarda semo".
Per deklamado de poemo
hungare oni kontribuis,
kaj versoj esperantaj fluis.*

*Dum paŭzoj devis ni rapidi,
por ke sufiĉu temp' por vidi
la librojn ekspoziciitajn.
Produktajn siajn altkvalitajn
la vilaĝanoj montris, vendis.
Suprizoj ĉarmaj nin atendis;
regalis oni nin diante,
miele, vinberprovianta!*

*Poeton de poetoj gloris
jam tiel ili, ke dekoris
la lampostangojn ĉefastrate
flagete, flore delikate.
Ĉar Ada Csizsár pro malsano
forrestis, Mészáros Istvano
rakontis en festparolado
pri l' Kaloĉaja vivopado.*

*Rakontis Nemere, verkisto
pri siaj verkoj kaj ekzisto
de mondoj en artisto ene,
per vortoj ne montreblaj plene.
Pri nuna lingvopolitiko
li diris, ke nur mistifiko
ja estas la kreskantaj kvantoj
de veraj angleparolantoj.*

*De ornamaĵoj ovoŝelaj
kaj lotumadpremioj belaj
pleniĝis dorsosako nia
en atmosfero simpatia.
Enbuse restis dolĉa gusto,
plezura sento en la brusto
kaj kore rememoro kara
pri l' tago en vilaĝ' hungara.*

herbojn kaj likenojn sub tiu arbo kaj mi ankaŭ lasas pomojn sub la sama arbo.

– Ĉu bona nun, Julfestulo?

– Jes, tre bona. Kaj nun, rigardu, geamikoj.

– Jesse, kial li murmuretas kaj kantetas?

– Mi.... Mi ne scias.... Sed RIGARDU Henna!

– BESTOJ!!!!

– Rigardu Jesse kaj Henna, bestamikoj alvenas. Huum...huuummmmm....

– Bestoj alvenas. Mi kredas, ke bestoj komencas manĝi. Sed kial Julfestulo plu kantetas, Jesse?

– Mi pensas, ke.... Jes, li parolas kun bestoj. Kio nun? Kelke da bestoj ekiras, kial Julfestulo? Kial vi volis, ke bestoj foriris?

– Ne, mi ne volis tion. Bestoj havas taskon. Baldaŭ vi vidos, kio.

– Rigardu, Henna! Bestoj venas reen. Kaj kunportas branĉojn de piceo, likenon kaj muskon. Rigardu Henna! Kion la birdoj faras nun?

– Birdoj faras.... Faras VERDAN STELON!!!!

– Jes, karaj infanoj. Mi rakontis al bestoj, ke vi ne pretigis stelon al supro de la julpiceo. Bestoj de arbaro volis helpi kaj fari al vi la verdan stelon. Sed ankaŭ bestoj esperas, ke vi memorus dum la tuta vivo, kion ili rakontas per la verda stelo: la verda estas koloro de espero.

Timo Pirinen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ Taneli Huuskonen, huuskone@cc.helsinki.fi www.esperanto.fi/helsinki
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohjantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 ✉ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ✉ martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu.
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla. ✉ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, ✉ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ✉ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ✉ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2004 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2005**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
1	1.1.	15.1.	5.2.
2	1.3.	15.3.	5.4.
3	1.5.	15.5.	5.6.
4	1.7.	15.7.	5.8.
5	1.9.	15.9.	5.10.
6	1.11.	15.11.	5.12.

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



La E-kursanoj en Jyväskylä studas lernolibrojn kaj vortarojn dum la kurso. Malantaŭe de maldekstre: Keke Uber (Australio), Petri Pellinen, Hilla Tulineito, Anu Pölkki kaj Elina Hallman. Antaŭe de maldekstre: Seija Kettunen, Jaakko Leinonen, Raita Pyhälä kaj Elisa Myllymäki. Artikolo pri agado en Jyväskylä sur p. 24.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Jutut 15.1.2005 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 15.1.2005 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafllehti@esperanto.fi>.